# La Riverego

Vintro de 2001 | Esperanto-Societo Kebekia | Nro 64, Jaro 16a

# En avant toute!

Nos cousins les Français ont entrepris un grand revirement au sein de l'espéranto en France. À la poubelle les mots «jeunesse espérantiste» qui riment avec «jeunesse communiste»: on parle maintenant de «jeunes espéranto-phones». Les associations sont devenues «Espéranto-Jeunes» ou «Espéranto-France» plutôt que les anciennes appellations plus longues et plus lourdes «Jeunesse espérantiste française» et «Union française pour l'Espéranto». Même la revue est passée de «Franca Esperantisto» à «Le monde de l'espéranto». Le grand ménage quoi!

Nous vivons dans un monde ou l'image a souvent plus d'importance que le contenu. De nombreux livres ont une page couverture d'avant-garde avec un contenu .....

Mais dans le cas du mouvement en France, il s'agit de changements en profondeur et non seulement de *look*. Vous avez entre les mains un exemplaire de *Le monde de l'espéranto*. Nous vous proposons donc de suivre le courant français et de vous abonner à cette revue dès maintenant. Le conseil d'administration de la Société québécoise d'espéranto (peut-être devrions-nous songer à changer pour Espéranto-Québec!), après de longues discussions, vous propose donc de remplacer *La Riverego* pour *Le monde de l'espéranto*. Nous sommes conscients que les coûts sont supérieurs mais la qualité de cette revue est nettement supérieure et la parution bimestrielle, donc 6 fois par année, comparativement à 4 fois l'an pour *La Riverego*, vous permettra d'avoir des nouvelles plus fréquemment. À l'occasion, une feuille y sera encartée, vous présentant les activités de la S.Q.E.

Nous vous invitons à vous abonner immédiatement selon les conditions se trouvant sur le formulaire d'abonnement ci-joint.

Nous croyons que *Le monde de l'espéranto* est un outil d'information de qualité que vous serez fier de présenter à votre entourage.

# Jes al progres'

La Francoj decidis vigle modernigi la movadon en Francio. Ili nun eldonas *Le monde de l'espéranto* kaj vi nun ricevas ekzempleron de la ĵusa numero. Laŭ mi tio estas kvalita eldonaĵo kaj post diskutado, la estraro de ESK decidis proponi al vi abonon al ĝi anstataŭ *La Riverego*. Certe la abonkosto pligrandas sed vi ricevos 6-foje jare (*La Riverego* aperis 4-foje jare) modernan eldonaĵon kiun vi fieros prezenti al viaj konatoj.

Ni invitas vin tuj plenigi la aliĝilon kun la ebleco aboni al *Le monde de l'espéranto*. Ekde 2002, *La Riverego* ne plu aperos kiel bulteno sed kiel simpla folio aldonita laŭ necese en *Le monde de l'espéranto* por prezenti la kebekiajn aktivaĵojn. Se vi ne tiom lertas en la franca lingvo vi povas daŭre resti membro de ESK kaj estonte aboni esperantlingvan revuon kiel *Esperanto* de UEA au *Monato*. Kontaktu nin por ricevi pliajn informojn.

Ni provos enkonduki *Le monde de l'espéranto* en la diversaj bibliotekoj tra Kebekio kaj se vi povus helpi en tiu projekto via kunlaborado bonvenas.

La estraro de ESK sincere pensas ke ankaŭ la Kebekia movado devas moderniĝi kaj prezenti pli profesian bildon al la publiko. Jam pere de la Interreto, ni prezentas tre kompletan aspekton de la lingvo kaj de la movado.

Akceptu miajn sincerajn sentojn kaj mi certe bonvenigas viajn komentojn.

*Normand Fleury, prezidanto de la ESK*

# De Zagrebo ĝis Strasburgo!

**Mia somero 2001 estis grandparte esperantista. Mi unue iris al la Universala Kongreso de Esperanto (UK) kiu okazis fine de julio en Zagrebo.**

La Zagreba UK ne estis aparte granda kun 1600 partoprenantoj sed mi diru ke ĝi estis bona UK. Kiel bona? Ĉar Kroatoj tre efike varbis kaj varbadis la publikon antaŭ kaj dum la kongreso. Ili tiom bone sukcesis, ke aperadis 50-o da artikoloj pri Esperanto en plej diversaj gazetoj. Ili ricevis fortan apogon financan de diversaj ministerioj kroataj (kulturo, turismo, ktp) kaj ankaŭ de urbaj instancoj. Malfermis la UK-on la prezidanto de Kroatio, S-ro Stipe Mesiĉ kaj tio okazis antaŭe nur en Kubo kiam Fidel Castro same faris. La granda balo okazis ekstere ĉe la ĉefa zagreba placo, tiel ke miloj da Zagrebanoj plie aŭdis pri Esperanto. La vesperaj programoj estis plene profesiaj, teatraĵo, nacia vespero kaj tiel plu. Dumtage mi estis okupita gvidi konversaciajn rondojn au deĵorante ĉe la Amerika budo. Kial mi ne diris ke la UK estis bonega? Ĉar temis ne pri unu sed pri *tri* kongresejoj. Necesis rapidi de loko al loko kaj tio ne ĉiam agrablis. Krome mankis komuna babilejo por renkontiĝi kaj babiladi (granda okupo de Esperantistoj). La Kroatoj multe laboris kaj vere penis pretigi plej bonan UK-on. Tio kio gravas ankaŭ estas ke ili ĉiam afable respondis demandojn, helpis laŭbezone. Ili meritas laŭdojn pro tio.

Kaj jen mi en la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Strasburgo, mia unua IJK en Europo de post 1991. La gejunuloj *vivas* de tagmezo ĝis tre malfrue nokte. Mi kutime ne plu eltenis post la 2-a nokte...nu, la programo estis iom kaosa kun pluraj ŝanĝoj, malfruoj sed tamen estis multe por fari krom ni diru inter la 20-a kaj la 22-a vespere. Fakte estis diversaj eblecoj sed noktomeze kiel nokta universitato, filmo, diskoteko kaj la gufujo. La gufujo (al maldiskoteko) (el gufo, nokta birdo) estis mia plej ŝatata nokta loko. La etoso estis belega, kun te-trinkado, amikeca babilado, tabloludado kaj foje duonhoraj prezentadoj (poezio, kantado) kaj ĉio en kandel-lumigita salono.

La ekskursoj estis bonaj kaj mi ankaŭ ĝuis la 2 aldonitajn biciklajn ekskursojn tra la urbo kaj al apuda belega vilaĝo Obernai. Dum la IJK okazis lingva festivalo kaj laŭ mi tio estis bona ideo lerte organizita. Mi ĝojis vidi ke la Francia movado malfermas sin publike kaj profesie. Eblis dum la dutaga festivalo vidi plej diversajn spektaklojn en Esperanto ĉe granda scenejo meze de urba parko kaj ĉe la budetoj lerneti 30-on da lingvoj. Gratulon al la organizantoj. Mi ne komprenas, sed en Esperantio la tempo pasas tre rapide. Jam estis la fino kaj la ĝisoj...kaj denove mi kolektis plurajn novajn amikojn el diversaj landoj. Tio estas la magio de esperantio. Ĝis Brazilo ! *Normand Fleury*

## Rakontu viajn vojaĝojn aŭ viajn gastigadojn!

Mi nuntempe estas serĉanta tekstojn de personoj, kiuj vojaĝis uzante Esperanton aŭ kiuj gastigis Esperantistojn de aliaj landoj pere de la Pasporta Servo, kadre de la finpretigado de la retpaĝaro de ESK. Se vi volas rakonti pri viaj aventuroj aŭ kontaktoj kun eksterlandanoj, bonvolu sendi al mi vian tekston, kiu povas esti tiel longa (aŭ mallonga) kiel vi deziras. Vi povas povas sendi ĝin poŝte al la adreso de ESK aŭ retpoŝte (mi preferus tion), al la adreso jessylapointe@hotmail.com.

*Jessy LaPointe*

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Autrement, l'abonnement annuel est de 10$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indoko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-doko de la Societo: kebk-d.

**Échéance pour le prochain numéro/Limdato por la venonta eldono: 2001.10.15**

Rédacteur en chef/Ĉefredaktoris Jessy LaPointe. Ont collaboré à ce numéro/Kunlaboris al tiu ĉi numero Normand Fleury, Zdravka Metz kaj Sylvain Auclair (Korektado). Administrateurs de la SQE/Estraranoj de ESK: Normand Fleury (président/prezidanto), Sylvain Auclair (vice-président-trésorier/vicprezidanto-kasisto), Jessy LaPointe (secrétaire/sekretario), François Bay kaj Yvon Roux.

Esperanto-Societo Kebekia/Société québécoise d'espéranto
6358-A, rue de Bordeaux
Montréal (Québec)
H2G 2R8
Telefonrespondilo kaj telekopiilo/Répondeur et télécopieur: (514) 272-0151
jessylapointe@hotmail.com
http://www3.sympatico.ca/esperanto

# Plus d'un million de visites sur le site de la SQE!

**Il y a à peine un an que la nouvelle page Internet de la Société québécoise d'espéranto est en ligne et voilà que la popularité croissante de nos pages nous a permis, le mois dernier, de franchir le cap d'un million de visites!**

Bien entendu, ce chiffre inclut les visites effectuées depuis la mise sur pied de la première version de la page Internet, il y a environ six ans.
La nouvelle page Internet, publiée au printemps 2000, offre de l'information sur l'espéranto en français et en anglais. Pour la version française, l'auteur de ces lignes a consulté une bonne vingtaine d'ouvrages de référence sur l'espéranto, la conjoncture linguistique mondiale et la linguistique pour offrir un résumé propre au média qu'est Internet.
Les personnes qui consultent le site peuvent y trouver rapidement les réponses aux questions les plus fréquentes: nature de l'espéranto et du mouvement espérantiste, motivations, activités, applications concrètes, etc.
L'information y est présentée de manière à permettre une consultation rapide, sans pour autant qu'on soit chiche sur la quantité de renseignements, pour ceux qui désirent effectuer une recherche plus profonde.
Quant à la version anglaise, elle est à moitié l'oeuvre de traduction de Paul Ronald et à moitié un outil de référence par hyperliens vers des sites anglophones.
Finalement, la version en espéranto présente le panorama de l'espéranto au Québec et offre une série d'informations sur notre province. Évidemment, cette section s'adresse aux espérantistes qui veulent en connaître davantage sur notre organisation ou sur notre coin de pays.
Étrange paradoxe: plus la Société québécoise d'espéranto a rendu son site complet, plus les demandes de renseignements complémentaires se sont multipliées, signe d'un intérêt croissant pour le phénomène de l'espéranto.
En fait, les courriels de demande d'information parviennent aujourd'hui en si grand nombre dans la boîte de réception de la Société qu'il devient de plus en plus difficile de répondre à toutes les demandes.

*Jessy LaPointe*

## Pli ol miliono da aliroj en la retpaĝaro de la ESK!

La nova retpaĝaro de la Esperanto-Societo Kebekia estas havebla surrete de nur iom pli ol unu jaro, sed ni jam superis la nekredeblan numeron de unu miliono da vizitoj!
Kompreneble, tiu nombro inkluzivas ĉiujn vizitojn, ekde la starigo de la unua version de nia retpaĝaro, antaŭ proksimume ses jaroj.
La nova retpaĝaro, eldonita dum la printemp 2000, proponas informojn pri Esperanto en la franca kaj en la angla. Por la franclingva versio, la aŭtoro de tiuj ĉi linioj tralegis proksimume dudek referencdokumentojn pri Esperanto, pri la monda lingva ordo kaj pri lingvistiko, kaj pretigis resumon taŭgan por la Reto. Tiuj, kiuj konsultas nian paĝaron povas rapide trovi en ĝi respondojn al la plej oftaj demandoj: naturo de Esperanto kaj de la movado, motivoj, aktivaĵoj, konkretaj aplikadoj, ktp. La informoj estas prezentataj tiel, ke oni ebligas rapidan konsulton aŭ profundan serĉadon, laŭvole.
Pri la angla versio, ĝi estas duone la verko de la tradukado de Paul Ronald kaj duone referencilo (per hiperligoj) al anglalingvaj paĝaroj.
Finfine, la Esperanta versio prezentas la panoramon de Esperanto en Kebekio kaj ofertas serion da informoj pri nia provinco. Evidente, tiu sekcio celas la informadon de la Esperantistoj kiuj volas pli bone koni nian organizaĵon aŭ nian provincon.
Stranga paradokso: ju pli kompleta nia retpaĝaro estas, des pli da informpetoj ni ricevas, signalo de kreskanta intereso pri la fenomeno Esperanto. Fakte, la numero da retleteroj obliĝis tiel multe, ke estas nun pli kaj pli malfacila respondi al ĉiuj petoj!

## Nous avons un besoin urgent de correcteurs!

La Société québécoise d'espéranto propose depuis cet hiver son propre cours d'espéranto sur Internet, plus adapté aux besoins des jeunes Québécois qui s'inscrivent de plus en plus nombreux.
Vous pouvez d'ailleurs le voir, à <www3.sympatico.ca/esperanto/cge.htm>.
L'équipe de correcteurs est présentement réduite à trois bénévoles, alors que ces cours constituent un puissant outil de diffusion de l'espéranto au Québec.
Quelques explications sur le rôle des correcteurs, qui doivent maîtriser l'espéranto et le français: ils choisissent eux-mêmes le nombre d'étudiants (normalement, deux pour commencer) et ils reçoivent les exercices des étudiants par courrier électronique.
Pour effectuer la correction, en cas de doute, ils ont droit au concours d'un expert.
Après avoir terminé la correction, ils renvoient le tout aux étudiants par courriel.

Contactez Marc Lavertu à kebek2@videotron.ca

# Diru... Kio okazos?

**Julio 2002**: 87-a Universala Kongreso de Esperanto, en Fortaleza (Brazilo)

**Ni organizas renkontiĝojn en Montrealo (MEK), por babili kaj praktiki la lingvon:**

**Vendredo, 28-an de septembro:** 19-a horo
**Vendredo, 26-an de oktobro:** 19-a horo
**Vendredo, 30-an de novembro:** 19-a horo

8ª Internacia Semajnfino Esperantista en **Okemo** Mountain Resort, Ludlow, Vermonto, Usono, De la 6-an ĝis la 8-an de oktobro 2001 (Dank-Festo en Kanado, Kolumbo-Festo en Usono). Aliĝu tuj!

**Esperanto-Domo de Montrealo**
6358-A, rue de Bordeaux
Métro Beaubien, Autobus Beaubien 18 Est
Métro Fabre, Autobus Papineau 45 Sud.

**Yvon Roux est le responsable des activités de la SQE à Montréal.**

**Les suggestions pour les prochains mois sont les bienvenues, contactez-le au (514) 727-8758.**

! Les membres de la société peuvent emprunter des livres et des revues de la bibliothèque. SVP laissez un message clair sur le répondeur (514) 272-0151 et nous vous recontacterons pour un rendez-vous. Merci et bonne lecture!

## Rencontres au Québec

Des rencontres se tiennent occasionnellement dans différentes villes: Québec, Sherbrooke, Hull, Chicoutimi, etc. Nous vous invitons à nous contacter pour vous joindre ou former un nouveau groupe local.

**MEK:** ***Montreala Esperanto-Klubo***

La Esperanto-Societo Kebekia proponas al vi renkontiĝojn en la oficejo de la strato De Bordeaux. Dum tiuj vesperoj, vi povas diskuti pri iu ajn temo, nur ĝojiĝante per la uzo de la lingvo. Aktivaĵoj povas ankaŭ esti organizataj, laŭvole. (esperanto@sympatico.ca, 272-0151).

La Société québécoise d'espéranto vous propose des rencontres, dans ses installations de la rue de Bordeaux. Dans le cadre de ces soirées, vous pouvez discuter de n'importe quel sujet, pour le simple plaisir d'utiliser l'espéranto. Des activités peuvent également être organisées, si vous en faites la demande. (esperanto@sympatico.ca, 272-0151).

# Ĝenerala jara kunveno
# Assemblée générale annuelle

La Société québécoise d'espéranto tiendra son assemblée générale annuelle au restaurant *Le Commensal*, au coin des rues Saint-Denis et Laurier à Montréal, le 30 septembre 2001, à 10 heures du matin. Tous les membres en règle de la Société sont invités à y participer. Il y sera question des orientations que la Société entend prendre pour la prochaine année, du bilan financier 2000-2001 et de la composition du conseil d'administration 2001-2003.

La venonta ĝenerala jara kunveno de la Esperanto-Societo Kebekia okazos ĉe la restoracio *Le Commensal*, je la angulo de la stratoj Saint-Denis kaj Laurier en Montrealo, la 30-an de septembro 2001, je la 10-a matene. Ĉiuj membroj de la Societo estas bonvenaj. Estos pridiskutataj la celoj de la Societo dum la venonta jaro, la financa raporto de 2000-2001 kaj la elekto de la estraranoj por 2001-2003.